# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 58, Numero 02, Februaro 2023*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Estrarkunveno de EFNSK

Dimanĉon la 12-an de februaro 2023, 9:00

Ĉeestis per Zoom
Prezidanto: Jonathan Cooper
Vicprezidanto: Andrew Spannenberg
Sekretario: Nicole Else
Kasisto: Alan Turvey
Estrarano: Dmitry Luŝnikov, Adam Levy
Membro: Rainer Kurz

Diskutitaj aferoj:

- nova lukontrakto por la fabriko kaj renovigoj
- inspektado de Esperanto Domo por termitoj
- sonlibro de Trevor Steele
- sunaj paneloj kaj baterioj por Esperanto Domo
- fakturo por elektro
- renovigo de membreco
- stipendio por la somerlernejo 2023
- poŝtmarkoj
- puzloj
- gastĉambro
- Sidneja Lingva Festivalo 2023
- Telopeo
- novaj membroj
- financa raporto

Bv., kontakti la federacion por detala protokolo de la februara kunsido.

La sekva renkontiĝo okazos per Zoom dimanĉon la 5-an de marto 2023 je la 9-a horo.

## Interesaj vizitantoj

*Nicole Else, sekretario de EFNSK*



Post longa paŭzo ni ree povis ĝui renkonti eksterlandajn Esperantistojn en Sidnejo.
La 7an de januaro mi havis la plezuron renkonti en la centro de Sidnejo Taesok Choe kaj lian edzinon kaj 2 filinojn. Taesok estas longtempa tre aktiva korea Esperantisto, kiu jam delonge loĝas en Litovio kaj instruas en la universitato de Vilno. Li konatiĝis kun sia edzino dum Esperanto-kongreso en Prago. Lia plej aĝa filino loĝas en Sidnejo. Lia plej juna filino tre bele kantas en Esperanto, spektu ekzemple https://www.youtube.com/watch?v=7Z_qsKy01tM
Ĉiuj 4 parolas Esperanton. La plej aĝa filino ne estas aktiva Esperantistino kaj do ne parolas same flue kiel la aliaj familianoj, sed ŝi tamen bone povis partopreni en la konversacioj.

La 18an de Januaro Katalin Kovats prelegis en Esperanto-domo. Ŝi estas hungarino kiu jam delonge loĝas en Nederlando. Ŝia edzo estas Franco kaj ŝia filo Marteno estas Esperantisto kaj poligloto. Ŝi kreis la gigantan retejon edukado.net Mi ne nur aŭskultis ŝian prelegon, sed ankaŭ ekskursis kun ŝi al Watsons Bay. Bela tago.





## La Biblioteko

*Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK*

Se vi iam vizitis la supran nivelon de Esperanto-Domo, vi vidis multajn libroŝrankojn laŭ la fora muro. Tio estas la federacia biblioteko. Ĝi estas mirinda kolekto, tamen ankoraŭ ne ekzistas plena katalogo de ĝia enhavo. Tio signifas, ke estis malfacile trovi specifajn librojn kaj ne ekzistas taŭga sistemo de pruntado.
Pro tio, la estraro decidis peti min katalogi ĉiun libron – ja granda tasko!
Do, ĉiun merkredon, mi trajnas de la Centra Marbordo al Redfern por fari tion. Kiel kroma avantaĝo, mi povas malfermi Esperanto-Domon al la publiko de 10:00 ĝis Libro-klubo komenciĝas je 17:00. (Mi kutime foriras je 18:00.)
Ĝis nun (la 20an de februaro), mi katalogis 1213 titolojn kaj 1762 librojn. (Ni havas plurajn ekzemplerojn de iuj titoloj.)

Iuj tre malnovaj libroj (ekz-e Paŭlo kaj Virginio de Hector Hodler, 1905, aŭ Lingvaj respondoj de Ludoviko Zamenhof, 1910) iros al federacia sekcio de la Esperanto-Arkivo, kaj oni rajtos legi ilin nur ĉe

Esperanto-Domo. Tamen, estas multaj aliaj libroj, de majstraj verkistoj kiel Kálmán Kalocsay, Julio Baghy, William Auld, Marjorie Boulton kaj, kompreneble, nia kara Trevor Steele, kiuj ja estos prunteblaj.

Inter la kategorioj de la libroj estas:
Romanoj; Novelaroj; Poezio; Teatrotekstoj; Paroladoj; Antologioj; Vortaroj; Gramatiko; Lernlibroj; Interlingvistiko; La Esperanto-movado; Artoj; Biografioj; Geografio/turismo; Historio/arkeologio; Humuro; Religio kaj Filozofio; Sano; Scienco kaj Teknologio; Socio kaj Politiko.

Mi esperas, ke la kataloga paŝo finiĝos antaŭ majo. Poste, ĉiu libro ricevos unikan kodon, la tuta kolekto estos ordigita, kaj sistemo estos kreata por ke membroj povu pruntepreni.






## “Kafejo” de Esperanto Domo

*Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK*

En la fino de 2023 la federacio plibonigis la korton de Esperanto-Domo kaj kreis lokon por “kafejo”.
La 1-an de marto dum la tago komence je la 12:00 la “E-kafejo” estos malfermita por membroj de EFSNK kaj invititaj gastoj.
Ankaŭ, je la 17:00 ĝis la 19:00 okazos speciala “Ĝis la revido!” festeto por Rainer Kurz, nia gasto el Germanio kaj membro de EFNSK.






<u>EFNSW</u>: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 09:00 ĝis 11:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

<u>Manlia Esperanta Klubo</u> ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

<u>La Meza Marborda Grupo;</u> 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
<u>Novkastelanoj</u>: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

<u>La Suda Marborda Grupo</u>; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

<u>La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo</u>:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estrarano: | Chris Betcher, Adam Levy, Dmitry Luŝnikov |